



aktuala

34-a ELDONJARO

Fondita en 1976 de Leo de Bruyne, informilo kaj oficiala organo de Esperantista Brusela Grupo, societo centjara neprofitcela fondita je la 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo "Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge" kun la N°0 419 498 274, honorigita kiel "reĝa" societo ek de 29a de Majo 1957.
 Redaktoro: Paulo Branco, 29 rue Froissart 1040 Etterbeek; Prezidanto: Angelos Tsirimokos, 405 av. Louise 1050 Bruselo; Kasisto: Claude Gladly, cgladly@arcadis.be, Abona membriĝo 10 eŭroj jare, konto EBG 000-0 123 048-52 Sekretario: Hélène Falk-Bracke, 7 avenue des Chênes, 1640 Rhode StGenese, informas +32 2 3584214, helene.falk@skynet.be; Kunvenloko n°2 rue Van Maerlant ĉiumerkrede 18h30-20h metroo MAALBEEK (tie nek poŝtkesto nek telefono). Informoj : ...
<http://users.belgacom.net/EBG> <http://ebg.skynetblogs.be> <http://uea.org> www.esperanto.be www.esperanto.net <http://eo.eventeo.net>
 Vidpunktoj de artikoloj en Aktuala Esperanto ne nepre spegulas opiniojn de ĉefa redaktoro aŭ de EBG - Esperantista Brusela Grupo

ENHAVO

- Paĝo 2 - Hélène Falk-Bracke pri nepo de Zamenhof (dua parto)
- Paĝo 3 - Barbara Poterucha de festo al festo
- Paĝo 3 - Esperantaj Eventoj tra fotoj
- Paĝo 5 - Tsirimokos pri Café Koppenberg ; Estraro de TEJO
- Paĝo 6 - ILEI Prezidanto ; Mondaj Gvidantoj
- Paĝo 7 - Sylla Chaves pri la pronomo "ci"
- Paĝo 8 - Geraldo Mattos opinias
- Paĝo 9 - UEA Membraro
- Paĝo 10 - Solvi la finanĉan krizon ; Aŭtomobile al Francio (dua lasta parto)
- Paĝo 12 - "Komerĉisto de la morto" estas esperantisto
- Paĝo 14 - Poemaro
- Paĝo 15 - Poterucha, Ricci kaj Tsirimokos pri Agapo

PROGRAMO DE LA MERKREDAJ KUNVENOJ

Julio kaj Aŭgusto : grupo ferias

Septembro 2009

- 2 Unua kunveno postferia prokrastita al la 16a de Septembro
- 9 Unua kunveno postferia prokrastita al la 16a de Septembro
- 16 Semajna kunveno unua post grupa ferio dum Julio kaj Aŭgusto
- 23 Grupanoj aŭ ne, prelegontoj estas ege bonvenaj, bonvolu sin anonci
- 30 Dua prelego de Seán Oriain pri "Toastmasters" prokrastita al Oktobro

Lia patro Adam estis fama oftalmologo. Li estis sperta praktikisto kaj docento en la Universitato. Li eĉ superis sian patron kaj postlasis multajn fak-librojn pri astigmatismo kaj glaŭkomo – li estis pioniro de la operacia kuracado de la retino. Lia patrino Wanda, ankaŭ oftalmologo, laboris kun li en la sama hospitalo.

Liaj gepatroj neniam devigis lin lerni Esperanton, sed en 1934 promesis kunpreni lin al la UK en Stokholmo sub la kondiĉo, ke li parolu la internacian lingvon. Tiam li estis nauĵaraĝa. (Same okazis kun lia onklino Lidia – legu en "Lidia")

Post invado de Pollando je la 1a de septembro 1939, Adamo, kiu, batalinte en la milito kontraŭ Ruslando en 1920, estis rezervoficiro kun la grado Kapitano, estis nomita Militkomandanto de la 1500-lita hospitalo "Czyste", unu el la plej grandaj en Pollando. En tiu sama hospitalo li estis arestita jam la 4an de oktobro; verŝajne li estis mortpafita la 29an de januaro 1940 kune kun aliaj ostaĝoj, enterigitaj en amastombo Baldaŭ Germanoj likvidis ĉiujn polajn mezlernejojn, universitatojn kaj bibliotekojn. Tia estis la nova politiko por orienta Eŭropo: «neniel estu permesita pli alta edukado; sufiĉas instruado de la signifo de trafikaj indikiloj» La Poloj rebatis rapide per "konspira edukistemo", en kiu Ludwik trapasos sian maturekzamenon en junio 1942, jam en la Varsovia getto.

De la 1a de decembro 1939 ekvalidis devigo por la judoj surporti blankan brakan rubandon kun blua sespinta stelo, kaj en aŭtuno 1940 estis ordonite al ĉiuj Varsoviaj judoj translokiĝi en difinitan kvartalon kun muro ĉirkaŭe – la t.n. **getton**. Tiutempe, vivis en Pollando la plej granda eŭropa juda komunumo de la diasporo : 3 milionoj kaj duono, pli ol dek el cento de la loĝantaro. Ili loĝis ĉefe en urboj : 300.000 en Varsovio. En antaŭmilita Pollando oni aperigis sur la identigilo mension pri religio : Katolika, Protestanta, Ortodoksa. Ĉar meti "liberpensulo" ne estis permesata, al tiu kiu ne deklaris unu el la tri kristanaj religioj, oni metis **mozeano** (judo). En tiu tempo, la polaj judoj ne imagis eblecon de getto, kaj tute ne de holokaŭsto, do la plej multaj ne sentis la bezonon farigi al si falsan identigilon. Kaj en la getto, falsa dokumento meritis mortpunon.

La getton oni instalas en la kvartalo **Muranów**, jam grandparte loĝata de judoj. La nejudoj estis forpelitaj post la konstruo de la muro, kaj devis mem serĉi novan domon. En la **getto**, la judoj estis de diversaj religioj. Ekz ; la poeto **Leo de Belmont** estis protestanto. Restis ankaŭ katolika preĝejo «paroĥo de Ĉiuj Sanktuloj» en kiu oficis **patro Godlewski** (kaj vikario Antoni Czarnecki) . Li disdonis multajn baptatestilojn al tiuj kiuj esperis tiel savi sian vivon. La aliaj pastroj estis elpelitaj . Ludwik ŝancis loĝi en tiu paroĥo, kiu estis la sola verda ĝardeno en la getto.

La infanoj estis ĉefaj viktimoj en la getto kaj samtempe veraj herooj. Sian rolon la infanoj povis ludi dank'al "humana" decido de la okupaĉia povo : ili ne devis surporti la judan rubandon ! Do, ebligis al ili trapasi la muron. Ĉe l' reveno enen, la germanaj ĝendarmoj ne postkuris la infanojn sed simple pafis, kiel sadisme ludantaj ĉasistoj. (Mi ne kapablas raporti la detalojn raportatajn de L. C. Z. Z. por ke la infanoj ne plu « ŝmuglu » (=kontrabande enportu varojn).

(Komence de vintro 1941-42, post invado de Sovetio kaj de la antaŭmilita orienta Pollando fare de la Naziaj armeoj, plano por ekstermi la tieajn judojn komencis efektiviĝi laŭ tradiciaj metodoj : viktimoj estis kolektataj, starigataj ĉe rando de kontraŭtankaj fosajoj aŭ de kavoj, kiuj ili mem elfosis, kaj mortpafataj. Ĝis fino de 1941 oni taksas je unu miliono la nombron de polaj judoj murditaj tiel.) ... (daŭrigota)

DE FESTO AL FESTO

Antaŭ somera libertempo, membroj de EBG havis plurajn okazojn festi. Kutimaj merkredaj preleĝoj finiĝis pri interesa temo "Toastmasters" fare de Seán ORiain. En septembro ni denove pritraktos tiun temon. Katoliko finis per tre festa kaj agrabla agapo en Eŭropa Klubo. Kelkaj niaj membroj partoprenis jubilean celebradon de 100-jariĝo de "Nederlanda Katoliko" en urbo Bergen-op-Zoom. Dudekaj da lernantoj festis en restoracio "Rugantino" sub rigardo de pupo "fidela krokodilo"! Samtempe ĉiuj trinkis ĉampanon okaze de naskiĝo de filo de nia nova kasisto Jan Amadori. Ankaŭ foje sinceraj gratuloj al feliĉa patro! Poste, ĉiel anoncite, ĉe Anne kaj Marc Demonty en Dilbeek venis plurajn esperantistojn, eĉ ne konataj dum niaj merkredaj renkontiĝoj, aŭ jamaj aktivuloj. Kun granda surprizo mi malkovris ankoraŭ alian flankon de talento de dom-mastroj: fajnan kuirarton, krome ornitologio, tradukado, japana poezio, breĉo de serpento kiu prezentiĝis sin en tute nova haŭto, k.t.p. La prezentitaj pladoj ĉe Demonty estis ege bongustaj, variaj kaj arte prezentitaj. Koran dankon al Anne kaj Marc, pro Via gastema akceptado! Ni ankaŭ ĝuis promenadon gviditan de Marc tra Dilbeek. Ni estis vere dorlotitaj kaj feliĉaj esti kune en amika etoso. Do, festojn oni bezonas por unuiĝi, konatiĝi kaj ĝui la vivon.

Barbara Poterucha

ESPERANTAJ EVENTOJ



Agrablega tagmanĝo de membroj de EBG ĉe Anne kaj Marc Demonty en Dilbeek, 27 de Junio 2009 (foto de Birdino)



La 3a de Junio, la preleganto pri belga konstitucio Georges Sossois sidas maldekstre due post la redaktoro Paulo Branco, trie sidas la prezidanto Angelos Tsimirikos, Sandra Schweder, Françoise Pellegrin, Simon Tite, Hélène Falk, Barbara Poterucha, Katarzyna Kuske. En dua foto, 24a de Junio, Seán Oriain (dua dekstre maldekstren) prelegas pri "Toastmasters".



104a Skota Kongreso en urbo Dundee, Skotlando, 5-7 Junio 2009



31a Cebalta Esperantista Printempo en plaĝo Mielno apud urbo Koszalin, Pollando, 9-17 Junio 2009



Esperanta aranĝo "FRESO 2009" en urbo Olsztyn, Pollando, 26 Junio ĝis 2 Julio 2009



45aj Baltaj Esperantaj Tagoj en Akademio de Polico de Paikuse apud la urbo Parnu, Estonio, 8-12 Julio 2009



La kunsidoj de la estraro de UEA kaj de la Akademio de Esperanto dum la 94a UK en Bjalistoko, 25-31 Julio 2009.



La Bjalistoka kongresejo (du unuaj fotoj). En tria foto kvar kongresanoj konataj de EBG, Barbara Pietrzak, José Augusto Pinto de Sousa, Marcel Delforge, Dlemante Aniciene. En kvara foto la preskaŭ 2000 kongresanoj en salono Zamenhof sub ega tendo.



Postkongreso en Malborko, Gdansk, Sopot, Gdiniia (1-5 Aŭgusto): Prezidanto Probal Dasgupta kun redaktoro; Malborka kastelo; Kongresanoj.

CAFÉ KROPPENBERG

Jam antaŭ kelkaj monatoj cirkulis en nia Grupo kuketoj el bruna ĉokolado kun portreto de Zamenhof el verda marcipano kaj indiko "Esperanto 2008", aĉetitaj de S-ro Maurice Wouters el iu bakejo kaj kafejo nomata Café Kroppenberg, en Bensberg apud Kolonjo. Eksciinte pli da informoj el ĝia retpaĝaro www.cafe-kroppenberg.de kaj taksinte la aferon interesa, Francine Sperber kaj Angelos Tsirimokos decidis viziti ĝin sabaton la 11an de julio 2009. Malgraŭ vetero ne tute taŭga por ekskurso, ili estis regalitaj per surpriza malkovro. Café Kroppenberg, ekster Kolonjo mem sed tre facile atingebla el la urbocentro per tramlinio 1, estas tipa germana *gemütlich* kafejo kaj bakejo, proponanta diversajn panojn, tortojn, vaflojn, k.s. Dank'al sia eksterurba situo, ĝi havas ankaŭ belan, tre bone prizorgitan florgardenon, kie oni povas sidi kiam la vetero permesas. Sed plej grave por ni, la mastro, Sinjoro Hermann Kroppenberg estas fervora esperantisto, kiu lernis la lingvon perrete sub gvidado i.a. de Peter Weide, la frato de nia relative malofte vidata membro Elisa Kehlet, eks-edzino de la iama transpreninto de Stafeto Torben Kehlet kaj bopatrino de Marko Lins, filo de Ulrich Lins, ktp. (nu, la "rondo familia"...), kaj kiu ĝis tiu tago **neniam estis uzinta Esperanton parole!** (Aŭ ne ekzistas Esperanto-rondo en Kolonjo, aŭ li ne scias pri ĝi.) Nia vizito estis do tre agrabla surprizo por li, kaj li afable sidis ĉe nia tablo kiom longe li povis (kvankam estis jam la pinto-horo, t.e. la 16a) kaj montris al ni sian laborejon (kuirejon kaj fornon). Neeviteble, li parolis iom malfacile, sed skribe li enviinde bone mastras la lingvon. Ni menciu ankaŭ, ke ĉiuj menukartoj estas haveblaj ankaŭ en Esperanto. Ĉu ne estus bona ideo, iam organizi grupan ekskurson al Bensberg apud Kolonjo?

Angelos Tsirimokos



Angelos Tsirimokos (EBG prezidanto) kaj Francine Sperber (Birdino, eksa estraranino de EBG) vizitas Esperantiston en urbo Kolonjo, Germanio, 11 de Julio 2009 (Foto de Birdino)

NOVA ESTRARO DE TEJO

Kun partopreno de pli ol 300 kongresanoj okazis en la ĉeĥa urbo Liberec la 65-a Internacia Junulara Kongreso, IJK (18-25 Julio 2009), pri kiu raportis novajelsendoj, interalie germana televido ARD. Dum IJK kunsidis ankaŭ la Komitato de TEJO. Plej grava punkto de sia tagordo estis la elekto de nova Estraro por la dujara periodo 2009-2011. Kiel prezidanto estis reelektita **Gregor Hinker** el Aŭstrio. **Paulína Koučová** el Slovakio fariĝis ĝenerala sekretarino kaj **Sergeo Tyrin** el Israelo kasisto. **Saša Kovjazina** el Ukrainio respondecos pri informado, **Lukaš Żebrowski** el Pollando pri IJK kaj kongresoj, kaj **Irmína Szustak** el Pollando pri landa agado. Kvar el la ses estraranoj estas novaj, nur Hinker kaj Tyrin oficis ankaŭ en la antaŭa periodo. Krome la Komitato elektis Marek Blahuš el Ĉeĥio kiel komisiiton pri reta agado. *Notu ke Gregor Hinker kaj Marek Blahuš estas bone konataj de EBG pro iliaj vizitoj kaj prelegoj ĉe ni.*

Reprenita el Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 333

ILEI PREZIDANTO STEFAN MACGILL

La 22-an de julio la Komitato de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, faka asocio aliĝinta al UEA, elektis novan 7-membran estraron. Kiel prezidanto de ILEI elektigis la konata pedagogo Stefan MacGill (Nov-Zelando/Hungario), kiu respondecos pri eksteraj rilatoj kaj kunordigo. Vicprezidanto Duncan Charters (Britio/Usono) okupiĝos pri universitata agado kaj instru-teknologia evoluo. Malgorzata Komarnicka (Pollando/Germanio) estas sekretario kaj Juliĵa Batrakova (Rusio/Nederlando) kasisto. La antaŭa prezidanto Radojica Petrović (Serbio) estis taskita pri edukaj projektoj kaj informado, kaj Zsófia Kőrödy (Hungario/Germanio) pri ekzamenoj, Esperanto-centroj kaj instrukapabligo. La fakoj de Julián Hernández (Kubo) estas lerneja kaj landa agadoj. El la antaŭa estraro nur Petrović kaj Kőrödy estis reelektitaj, sed MacGill kaj Charters membris en la estraro de ILEI jam pli frue, respektive kiel vicprezidanto kaj prezidanto.

Reprenita el Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 333

KVAR MONDAJ GVIDANTOJ

La 16-an de junio okazis en la rusa urbo Jakaterinburgo la unua pintkunveno de Brazilo, Rusio, Hinda Unio kaj Ĉinio. Tiuj kvar landoj intencas kunlabori pli intense kaj elpaŝi kune en la monda politiko. En Jakaterinburgo, kie la ĉefa temo estis la nuna ekonomia krizo de la mondo, renkontiĝis la ŝtatestroj Dmitrij Medvedev el Rusio, Luiz Inácio Lula da Silva el Brazilo kaj Hu Jintao el Ĉinio, kaj la barata ĉefministro Manmohan Singh. Post la kunveno la prezidanto de UEA, prof. Probal Dasgupta, skribis al la kvar gvidantoj, karakterizante la eventon kiel historian. "Ekonomia krizo okazigita alilande trafas viajn landojn grave, ne nur pro la nekredablaj riskoj kaj ŝuldoj alprenitaj en Usono, sed ankaŭ pro la fakto, ke la valuto de nur unu lando rolas kiel internacia valuto", li komentis la temon de la kunveno. Per tio li samtempe enkondukis proponon: "Universala Esperanto-Asocio proponas al vi la ideon, ke valutoj kaj lingvoj funkcias sammaniere. La internacia uzo de la angla plifortigas nur kelkajn privilegiitajn landojn kaj samtempe starigas riskojn kaj kostojn por ĉiuj aliaj. Ĉu tiaj privilegioj, valutaj kaj lingvaj, kondukis nin al pli bona mondo? Ĉu la kostoj estis efikaj? Certe ne." "Viaj kvar landoj estas promesaj landoj por la estonteco. Sed vi, kiel ni tra la tuta mondo, devas ĉesigi la valutajn

kaj lingvajn privilegiojn, se ni volas progresi rapide, malpli koste kaj harmonie. Pri nova valuta sistemo, vi jam havas ideojn kaj proponojn. Por nova lingva sistemo, ni proponas Esperanton kiel efikan, pragmatan kaj malpli koston solvon." La letero de prof. Probal Dasgupta estis sendita al ĉiu ricevanto, kvar, en ties propra lingvo.

Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 332

BRAZILA ŜTATESTRO RESPONDIS

La Prezidanto de UEA Probal Dasgupta sendis leteron al la brazila, ĉina kaj rusa ŝtatestroj kaj al la barata ĉefministro, kiuj kunvenis kelkajn tagojn por diskuti pri la monda ekonomia krizo kaj pri pli intensa kunlaboro inter siaj landoj ĝenerale. La gvidantoj de la kvar "promesaj landoj por la estonteco", laŭ la karakterizo de Dasgupta, diskutis interalie pri kreo de nova valuta sistemo. En sia letero la Prezidanto de UEA atentigis ilin ankaŭ pri la bezono de nova lingva sistemo, kiu ne privilegiu kelkajn landojn, kaj pri Esperanto kiel la lingvo, kiu ebligus ĝin. Intertempe prof. Dasgupta ricevis la ĉi-suban respondon komisiitan de la brazila prezidanto Luiz Inácio Lula da Silva:

"Al Probal Dasgupta,

Prezidanto de Universala Esperanto-Asocio
Prezidanto Luiz Inácio Lula da Silva taskis nin respondi vian leteron de la 20-a de junio 2009 adresitan al li, por danki pro via zorgo pri la egaleco en internaciaj rilatoj, tiel en la financa kiel en la lingvaj aspektoj.

Ni ŝatus montri al vi nian admiron pro la klopodo, kiun esperantistoj de la tuta mondo entreprenas cele al la disvastigo ĉiam pli granda de Esperanto, lingvo kreita de doktoro Lazaro Zamenhof kiel kontribuajo por la interkompreno kaj komprenemo inter la homoj.

Ni scias, ke en la historio de la homaro, estis lingvoj, kiuj enrudigis kiel sekvo de la politika hegemonio, kiel latino, aŭ centgrade la franca kaj poste la angla. Ni deziregas ke, fakte, iun tagon Esperanto povu esti akceptita de plejparto de la nacioj kiel lingvo adoptita por faciligi la komunikadon sen lingvaj privilegioj.

Ni certas, ke Universala Esperanto-Asocio daŭrigos siajn demarŝojn ĉe Unuigintaj Nacioj por laŭgrade pligravigi la rolon de Esperanto kiel internacia lingvo. Sekve ni ne vidas necesa pridiskuti la aferon, ĉar ni konsentas pri la valoro de la lingvo disvastigata de via asocio. Sincere,

Cláudio Soares Rocha,
Direktoro pri Historia Dokumentado,
Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 337

SYLLA CHAVES FORPASIS

La brazila verkisto kaj pedagogo Sylla Chaves (1929-2009) forpasis la 30-an de majo, nur tri tagojn antaŭ sia 80-jariĝo. Li studis juron, komunikadon, kibernetikon kaj politikan sciencan. Li laboris ĉe UN en Novjorko kaj Unesko en Parizo kaj profesoris en la Brazila Lernejo pri Publika Administrado. Chaves lernis Esperanton en la 30-jaroj kaj ekaktivis en 1946. Li estis prezidanto de Brazila Esperanto-Ligo 1978-82. En Parizo Chaves partoprenis en la Esperanta kabaredo de Raymond Schwartz. Ofta premiito en la Belartaj Konkursoj de UEA, li aperigis la poeziajn volumojn "Animo prisma" (1959) kaj "Por pli bona mondo" (1970). Chaves provizis la brazilan movadon per modernaj instruiloj: krom multaj lerno- kaj legolibroj, afiŝoj, aŭdvidaj materialoj, teatraĵoj kaj la volumo "100 jaroj da kantado en Esperanto" (1989), aperis de li amaso da diskoj kaj kasedoj, ĉiuj kun profesiaj muzikistoj. Li kompilis la 2100-vortan "Suplemento al la Granda vortaro Esperanto-Portugala" de Ismael Gomes Braga (1989) kaj en 1991 aperis lia populara "Originala Esperanta bildvortaro". Chaves estis membro de la Akademio de Esperanto 1986-96 kaj Honora Membro de UEA ekde 1992.

Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 328



Sylla Chaves prelegante en Rio de Janeiro, honora membro de UEA, eksa akademiano, ĵus forpasita la 30-an de Majo

LA PRONOMO "CI" EN ESPERANTO

En la tiel nomata "Plena Gramatiko de Esperanto" estas menciataj nur naŭ personaj pronomoj: **mi, vi, li, ŝi, ĝi, si, ni, ili** kaj **oni**. Sed en la Ekzercaro aperas ankaŭ la pronomo **ci** kaj la vorto **moŝto** (kies uzo post "**via**", kun aŭ sen adjektivo, donas al ĝi funkcion de pronomo). Tiuj du vortoj permesas, ke Esperanto havu ankaŭ riĉecon, kaj ne nur simplecon. Esprimoj kiel "**via reĝa moŝto, via episkopa moŝto**" kaj pluraj similaj donas

7

la tutan hierarkion de respektaj formoj kun granda ŝparo. Eĉ la ankaŭ fundamenta vorto "**ekselenco**" fariĝas nenecesa.

La vorto "**vi**" povas esti uzata singulare kaj plurale, kaj tial povas esti konfuza (t.e. bezonas aldonan precizigon) kaj estas sennuanca, kontraŭe al "**ci**" kaj "**moŝto**". **Moŝto** montras plurajn respektajn nuancojn, kaj "**ci**" ne nur aldonas precizigon, sed ankaŭ intimecon. En gloso de mia aperinta "Brazila Esperanta Parnaso", mi klarigas la uzon de la pronomo "**ci**" jene:

ci = vi (kiam uzata por nomi unu solan alparolaton). "Anstataŭ "**ci**" oni uzas ordinare "**vi**" estas ofte citata diro de Zamenhof. Se li kreis kaj uzis tiun vorton, li do konsideris ĝin utila. Ĉar ankaŭ mi konsideras ĝin utila, ĝi plurfoje aperas en tiu ĉi antologio. Nuntempe ĝi estas uzata en jenaj kazoj: **1.** en tradukoj el lingvoj por kiuj la nuancoj inter **ci** kaj **vi** estas gravaj; **2.** kiam ajn (skribe aŭ parole) gravas distingi inter unu kaj pluraj alparolatoj: "tion mi demandas nur al **ci** (kaj ne al la aliaj)"; **3.** por emfazi intimecon aŭ familiarecon: "eĉ al sia estro li kutime diras **ci**".

Kelkaj gravuloj volas "dekreti" la arkaikecon de tiu fundamenta vorto. Kaj kelkaj novuloj sekvas iliajn paŝojn, pro manko de bonaj ekzemploj en siaj lernolibroj kaj vortaroj. Mi tamen reagis, kun ekzemploj ne nur miaj sed de pluraj bonaj aŭtoroj kaj vortaristoj.

Krom la uzado beletra, la interparola uzado de "**ci**" estas ankaŭ tre ofta, precipe en landoj, kies lingvoj havas la samajn nuancojn. Tial mi plurfoje kaj plurloke (dum mia dekjara vivo ekster Brazilo) rimarkis, ke gepatroj inter si kaj al siaj gefiloj uzas la pronomon "**ci**" ne nur nacilingve, sed ankaŭ Esperante.

Ŝajnas al mi nekoheraj la geesperantistoj, kiuj nacilingve **cidiras** kaj Esperante nur **vidiras**. Eĉ riano (kiu, laŭ kelkaj neobservemaj esperantistoj, uzas nur la pronomon "você") al siaj intimuloj ĉiam diras "eu te vi", "sou teu amigo" ktp. Kial do li kaŝas sian intimecon vidirante siajn "samideanojn"? Ĉu li volas, ke Esperanto estu sennuanca kodo? Aŭ vasaligi Esperanton al la reĝa angla lingvo, en kiu (ankaŭ laŭ malatenta rigardo) al ĉiuj oni diras "you"?

8

Ekde la elekto de Sarkozy por la franca prezidanteco, oni multe diskutas pri la gravegaj nuancoj de "tutoyer" (**cidiri**) kaj "vouvoyer" (**vidiri**). Por restaŭri la ordon en la lernejoj, tiu iom dekstrista registaro malpermesas al gelemantoj **cidiri** siajn instruistojn. Samtempe, modernigante siajn interrilatojn, ĝi decidis forĵeti sian formalecon. Prezidanto kaj ministroj ne nur kuras kune laŭ arbaraj padoj, sed ankaŭ komencis **cidiri** unuj la aliajn en siaj kunsidoj. Dume, tiuj, kiuj malbone konas anglojn kaj nesufiĉe lernis la anglan lingvon, asertas, ke angloj – simple kaj demokrate – al ĉiuj diras "you". Malvere! La angla lingvo, ankaŭ tiurilate, estas pli komplika ol la latinidaj kaj slavaj, kaj eĉ ol la germana. La angloj ne nur inversigis la trafikdirektojn surstrate, sed ankaŭ la uzon de pronomoj.

Preskaŭ ĉiuj lingvoj majuskligas pronomojn de la dua kaj tria personoj, por indiki respekton. La angla estas la sola, kiu majuskligas la pronomon "**mi**" (angle: I). Por indiki kion? Mi konfesas, ke mi ne scias. En preskaŭ ĉiuj lingvoj ekzistas "**ci**" kaj "**vi**". En la plimulto "**ci**" indikas intimecon. En la angla ankaŭ ekzistas ambaŭ, kun inversa signifo. La respekta pronomo estas "**thou**" (**ci**), kiun pluraj uzas nur por sin direkti al Dio. Por indiki respekton al malpli gravaj estuloj oni devas aldoni aliajn vortojn. Tial infanoj kaj subuloj ne rajtas diri al gepatroj aŭ aŭtoritatuloj "you", sed "you, Sir", "you, Madam". Aŭ uzi aliajn variaĵojn, dependajn de la alparolato. Ekzemple: you, Miss... Mylord... Mylady... Highness; ktp.

Plene kopii la anglan lingvon signifas malfaciligi kaj malinternaciigi Esperanton. Duone kopii, uzante nur "**vi**", forprenas la bezonatajn nuancojn. Por via amuzo kaj konscia aŭ nekonscia vasaliĝo al la angla, vi povus esti pli koheraj. Inversigu la signifon de "**ci**", kaj uzu ĝin por direktiĝi al Dio. Kaj uzu "mi" majuskle. Aŭ, pli bone, studu "Basic English" – ĝi estus multe pli serioza lingvoprojekto ol tiu kripla Esperanto. Do, karaj geamikoj, vi rajtas havi preferojn kaj malami iun ajn vorton, eĉ fundamentan. Zamenhof saĝe permesis, ke oni sennuanca parolu. Sed ne "dekreti" morton de plene vivanta vorto, per kiu aliaj volas montri nuancojn. Estu liberaj kaj lasu nin libere moviĝi "ene de la Fundamento".

Sylla Chaves, Kultura Kooperativo de Esperantistoj, Brazilo

GERALDO MATTOS OPINIAS

Persone Geraldo Mattos batalas kontraŭ la oftaj misuzoj de la participoj, kiujn klarigas tri facilaj sencoreguloj, ĉar participoj ne estas io gramatika, sed semantika, kaj do generas nur paradoksaĵajn sencorerarojn:

-**anta/-ata**: dum fakto trudata de verba radikalo

-**leganta/legata**: dum lego

-**inta/-ita**: post fakto trudata de verba radikalo

-**leginta/legita**: post lego

-**onta/ota**: antaŭ fakto trudata de verba radikalo

-**legonta/legota**: antaŭ lego

Ĉiu tamen bonvolu pensi, kio okazas post la fakto trudata de la verba radikalo: dorminta homo estas homo post la dormo, sekve vekita aŭ vekigiinta...



Geraldo Mattos, sia plej juna filo, sia dua ezino post vidviĝo lia

Ni vidu nun, kion diras al ni la nuna Statuto pri kelkaj el siaj esencaj punktoj! La celon informas la 1-a artikolo de la Statuto: konservi kaj protekti la fundamentajn principojn de la lingvo Esperanto kaj kontroli ĝian evoluon. Pri la membroj komentas la 3-a, 4-a kaj 5-a artikoloj: ili konfirmas respektive la limon de 45 membroj, la 9-jaran mandaton kaj la elekton de unu triono ĉiun trian jaron. Sekve de tio, ĉiu akademiano estas senmorta por naŭ jaroj!... En la 15-a, 16-a kaj en la 17-a artikoloj aperas la organizo de la Akademio, kiun kondukas la membroj de la Estraro kaj la direktoroj de Sekcioj kaj Komisionoj.

Ĝin orientas la Estraro kaj la estraranoj. Prezidanto: John Wells. Vicprezidantoj: Probal Dasgupta kaj Brian Moon. Sekretario: Renato Corsetti. Ĝin laborigas

la direktoroj de Sekcioj por lingvaj taskoj, kaj tiuj de Komisionoj por alispecaj. Faka Lingvo: Marc Bavant. Ĝenerala Vortaro: Bertilo Wennergren. Gramatiko: Jouko Lindstedt. Kontrolado de lerniloj: Marc Bavant. Lingva Konsultejo: Boris Kolker. Literaturo: Humphrey Tonkin. Prononco: Probal Dasgupta. Historio de la Akademio de Esperanto [komisiono]: Carlo Minnaja. Precipe grava estas ĝia Lingva Konsultejo kiu povas prezenti al nia publiko – unuopuloj, grupoj kaj institucioj! – rapidajn solvojn por ĉiaj lingvaj problemoj sub sia respondeco. La respondeco de la Akademio postulas pli da tempo! La agado estas klarigata en la 20-a kaj 22-a artikoloj de la Statuto: La Akademio esploras ĉiajn lingvajn demandojn, kiuj koncernas Esperanton, kaj ilin poste decidas rekomendi aŭ aprobi, malrekomendi aŭ malaprobi.

En unu sola momento de ĉiu jaro la Akademio de Esperanto sin prezentas ĉeesta al sia publiko: dum la Universalaj Kongresoj. Kaj nun en la fino de mia referato, mi petas de mia afabla geleganto permeson por meti mian nazon en fremdan vazon, ĉar mi ne estas historiisto. Ĉiuj parolas pri du periodoj en la historio de la Akademio, sed pli bone estus akcepti tri periodojn: la unua ĝis la fino de la Unua Mondmilito kaj ĝiaj kostoj al Esperanto (1905-1920), karakterizata per la prudenta influo de Zamenhof, la dua de tiam ĝis la fino de la Dua Mondmilito kaj ĝiaj kostoj al Esperanto (1920-1946), konata per la forta influo de Cart, kaj la tria de tiam ĝis nun, markata per la vigla influo de Waringhien. Dojeno estas Marjorie Bulton, akademianino de 1967, sed estas du el la sekvanta triono de 1970: John Wells kaj Geraldo Mattos.

Geraldo Mattos Gomes dos Santos,
eksa prezidanto de la Akademio de Esperanto (ĝis 2007)

MEMA BIOGRAFIETO

Geraldo Mattos Gomes dos Santos, brazilano de 28.06.1931, esperantisto de 1947 tra trovo de la libro *Die Esperanto-Spraĉe*, de Arnold Behrendt, membro de la Akademio de Esperanto de 1970 kaj ĝia prezidanto inter 1998 kaj 2007, pensiulo (emeritulo) de la

Federacia Universitato de Paranao kaj de la Militista Kolegio de Kuritibo post po 30 jaroj da laboro kaj pensiulo de la Ministerio pri Laboro post 40 jaroj da laboro. Diplomiĝis pri latina kaj latinidaj lingvoj en la Pontifika Katolika Universitato de Paranao en 1958 kaj doktoriĝis pri filologio per disertacio pri la kantikoj [trobadoraj poemoj] de kleriko Ayra Nunes, galega poeto de la XIV jarcento, post konkurso malfermita de la Federacia Universitato de Paranao en 1965. Verkis siajn unuajn poeziajn librojn en 1953: La Tendo de la Junulo kaj Ivan VI, ŝajne la sola versa kvinakta tragedio en Esperantujo. Laciĝis pri esti poeto en 1987 pere de la libro *La Deveno de Esperanto*, eldonita de Fonto, kaj de tiam sin dediĉas al la studo de la lingvo mem, precipe por la defendo de la Fundamenta uzado de niaj participoj, kies esencan sistemon la Akademio ne sukcesis klarigi sub Waringhien. www.gmverda.com.br

Menciindaj verkoj:

Centjara Esperanto;

La deveno de Esperanto;

La servorajtoj;

Barbaraj sonoj kaj sonetoj;

Apartaj mondoj: verboj kaj participoj;

En la komenco estas la vorto;

**Introdução à Linguística Matemática
(Matematika Lingvistiko portugallingve)**

UEA MEMBRARA EVOLUO

Meze de la jaro estas bona momento rigardi la evoluon de la membrostatistiko. Je la 30-a de junio estis 5351 individuaj membroj; je la sama dato pasintjare 5270. Okazis do kresketo de 81 membroj. Tio ne signifas, ke la jarfina nombro superos per 81 tiun de 2008. Ĝi povos esti pli granda sed ankaŭ malpli granda. La nuna diferenco tamen estas tiom granda, ke mi supozas, ke la nombro almenaŭ ne malkreskos ĉi-jare. Kompreneble mi esperas, ke dum la dua jarduono ankaŭ oni aktive varbos membrojn, por ke la fina nombro reproksimiĝu al 6000. La aligitaj membroj plimultiĝas ankaŭ ĉi-jare. Fine de junio 12 landaj asocioj ankoraŭ ne pagis, sed la aliaj landoj pagis por 597 membroj pli ol lastjare. Ankaŭ la mankantaj landoj certe ankoraŭ pagos - temas ja pri devo - sed kelkaj verŝajne por malpli da membroj. Depende de ili la fina nombro de aligitaj membroj estos je 300-500 pli ol en 2008.

Osmo Buller, Ĝenerala Direktoro C.O. UEA, la 1-an Julio 2009

SOLVI FINANCAN KRIZON?!

En iu malgranda turisma insuleto de Grekujo, iom pluvas kaj nenio okazas. La krizo sentigas siajn efektojn. Ĉiuj havas monajn ŝuldojn kaj ĉiuj ŝuldas al ĉiuj. Subite, iu rusa riĉa turisto alvenas al la akceptejo de la malgranda loka hoteleto. Li demandas pri ĉambro por kelkaj tagoj kaj tuj metas bileton de 500 eŭroj sur la vendtablo. Li petas pruntoŝosilo kaj supreniras al la tria plej alta etaĝo por dumtempe inspekti la ĉambrojn kaj la panoramon, kondiĉe ke li rezignos se ĝi ne sufiĉe plaĉos.

La hotelestro prenas la bileton de 500 eŭroj kaj kuras al fiŝvendejo kie li ŝuldas. La fiŝvendisto kuras pagi al fiŝaŭkciejo kiu liveras la fiŝojn al li. La fiŝaŭkciejo kuras pagi al fiŝkaptisto kiu estras boaton kiu fiŝkaptas. La fiŝkaptisto kuras pagi al dungita fiŝkaptisto kiu laboras en boato. La fiŝkaptisto kuras pagi al iu ĉiesulino kiu antaŭe cedis ŝiajn servojn al li kredite. La ĉiesulino kuris al hoteleto kie ŝi ŝuldis 500 eŭrojn pro la sporada uzado de iu ĉambro por ricevado de klientoj.

Tiam, iom poste, la rusu malsupreniris al la akceptejo kaj informis la hotelestron ke la proponita ĉambro ne taŭgas, ĝi ne sufiĉe plaĉas al li. Li rezignas, petas kaj trete ricevas la bileton de 500 eŭroj.

Tra tia mona movado, profito aŭ aldonita valoro tute ne ekzistis. Tamen, ĉiuj nuligis siajn ŝuldojn kaj tiuj loĝantoj de la insuleto rigardas estonton nun kun bona fido. Financa krizo jam ne ekzistas por ili, ĝi estas solvita almenaŭ dumtempe. Jen interesa eta modelo por solvi la mondan finanĉan krizon...ĉu?!

Olga Lage, elportugaligis P.B



AŬTOMOBILE AL FRANCUJO

(dua lasta parto)

Pri niaj plej fortaj impresoj...

Urboj: Ni jam vizitis Francion dum antaŭaj jaroj. En la jaro 2007 dank' al afabla Aleks Kadar, kiu konsentis ĉiĉeroni, mi konatiĝis kun famega Parizo, kaj pasintjare ni kun Jana ekkonis hejmeccan La Ciotaton dank' al Renee Triollee (fakte ĝuste dank' al ideo de Renee okazis nia ĉi jara prelegvojaĝo). Sed ne eblas kompari tion, kion ni vidis pli frue, kun riĉa geografio de nia ĉi jara vojaĝo en Francio. Belegaj antikvaj urboj... Ili estas kvazaŭ vizaĝo de tiom diversa Francio. Ni ĝojas, ke ekkonis ĝin...

Ankoraŭ unu miro: ni eksciis, ke multegaj historiaj monumentoj (kasteloj) en Francio estas privataj (en nia lando preskaŭ ĉiu historia monumento dume estas ŝtata). Mi ne povas diri ĉu tio estas bona aŭ ne, sed tiel estas, kaj estas ne tre kutima por ni.

Vilaĝoj: Tio, kion oni nomas vilaĝo en Francio, ne estas la sama, kio estas vilaĝo en Ukrainio. En multaj malgrandaj vilaĝoj de Francio ni trovis belegajn preĝejojn, oldajn belajn domojn, kiuj vidis kelkajn jarcentojn. Puraj kaj hejmece kvietaj ili kvazaŭ estas speciale kreitaj por trankvila, sana vivo kaj ripozo. Oni rakontis, ke multaj homoj, kiuj laboras en grandaj urboj, elektas apudajn vilaĝojn por loĝi, kaj mi komprenas ilin. Krom de pli malmultekosta loĝado ili havas puran aeron, liberon sen urba bruo, sen streĉa trafiko de granda urbo...

En Ukrainio vilaĝoj estas pli kamparaj, kun plejparte teraj neasfaltitaj vojoj kaj unuetaĝaj domoj. Dum lastaj possovetiaj jaroj ankaŭ en ukrainiaj vilaĝoj oni komencis konstrui preĝejojn, sed tio okazas ne en ĉiuj, nur en pli-mapli grandaj vilaĝoj. Nuntempe en ukrainiaj vilaĝoj aperas ie de ie grandaj domoj de tiuj, kiuj havas monon kaj ŝatas loĝi tie, kie estas pli multe da freŝa aero, tie, kie eblas perdiĝi...

Esperantistoj: Mi devas sincere diri pri tio, ke ĉie en urbojn kie ni gastis, nin gastigis tre interesaj, amikemaj, aktivaj homoj, kies aktiveco kaj energio fortigas kaj varmigas esperantaj rondojn. En nia vojaĝo ni multe studis pri tio, kiel estas organizata komunikado en esperantaj kluboj, kiel oni instruas, kiel povas ripozi komune.

Esperanta movado en Francio vere bonŝancas pro tio, ke ĝi kiel socia movado estas subtenata de la ŝtato. Ekzemple en urboj, kie mi pli-malpli konstante vivas (Berdjansko, Donecko - sud-oriente de Ukrainio), ĉiam granda problemo estis kaj restas ricevi ejon por kunvenoj de esperanta klubo kaj esperantaj kursoj. Ĉiam ekzisto de ejo por esperanta klubo en urboj de Ukrainio estas granda sukceso kaj rezulto de individua laboro kaj personaj financaj resursoj de iu aktivulo aŭ grupo de aktivuloj. Sed mi ne scias pri okazoj, kiam ekzemple iu urbestro en Ukrainio permesus senpage uzi iun urban ejon por kunvenoj de esperanta klubo.

Francaj vinoj kaj fromaĝoj: Vinoj kaj fromaĝoj de Francio estas konataj por ukrainoj kiel tre kvalitaj kaj diverspecaj. Certe ni devis gustumi kaj ion kunpreni al Ukrainio. Ni ĉion sukcesis!

Nun ni iomete pli spertas pri manĝmaniero en Francio.

Ni eksciis, ke fromaĝoj estas aparta parto de manĝa proceso dum tagmanĝo. Nun ni povas konfirmi, ke fromaĝoj en Francio estas multegaj kaj multaj estas tre bongustaj. La plej plaĉis al ni formaĝo "St Agur", kiun ni unuan fojon gustumis en Monferrier.

Vinoj de Francio estas mondfamaj, kaj ni ne povis preteratenti eblecon gustumi ilin. Eblas konstati: francaj vinoj estas tre bonaj kaj multoble pli multspecaj, ol fromaĝoj. Sed plej ekplaĉis al ni duondolĉaj blankaj vinoj.

Ni eksciis, ke ruĝan vinon en Francio oni povas drinki kun siropo.

11 Kaj ankoraŭ ni eksciis, ke matenmaĝo en Francio estas simbola, tute ne peza por stomako manĝo...

Ne teo, sed kafo: Ni trovis, ke en Francio oni tre-tre malofte trinkas teon. Oni preferas kafon, kaj tio estas nekutima afero por ni, ĉar ekzemple en nia hejmo la plej ĉefa varmiga trinkaĵo estas teo. Eble pro tio, ke Ukrainio estas pli proksima al Azio...

Maroj: Dum unu vojaĝo niaj manoj eksentis akvon de Mediteraneo, de Atlantiko kaj de Maniko. Tio ne estis miraklo, sed tio estis simbola, ĉar signis randojn de nia Eŭropa tero...

Francoj kaj poŝtelefonoj: Ni rimarkis, ke en Francio nemultaj homoj uzas poŝtelefonojn. En Ukrainio estas male - poŝtelefonojn uzas ĉiuj. Multaj homoj havas po kelke da poŝtelefonoj, por paroli ene de diversaj mobilaj retoj. Eble tio okazas pro tio, ke telefoni tiumaniere en Ukrainio kostas multoble malpli. Sed ankaŭ mi rimarku: vivo sen poŝtelefono estas pli trankvila...



D-ro Demianenko prelegante en Bruselo ĉe EBG je 1 de Aprilo

Dankojn: Ni sincere dankas ĉiujn, kiuj helpis pri kaj en nia vojaĝo. Speciale dankon al Renee Triollee kaj Yves Nicholas, ke tiu ĉi vojaĝo okazis. Dankon pri afabla kaj komforta gastigo al ĉiuj, kiuj akceptis nin, - al Gastonon Riste (Romans), Monique Filler (Mours), Renee Triollee (La Ciotat), Serge kaj Monique Eysseric (Monferrier), Andre kaj Polette Andrieu (Villeneuve), Marie-Helene Desert kaj ŝia familio (St Fo La Grande), Cantal kaj Patrik Barret (St Nazaire), Anne-Marie Argney (St Malo). Dankon al Paŭlo Branco, kiu gastigis nin en Bruselo, kie ni sentis nin kvazaŭ hejme.

Dankon al ĉiuj niaj novaj geamikoj, kiujn ni ekkonis en Francio...

Kostiantyn Demianenko, Berdjansko, Ukrainio, 25.04.2009

12

"KOMERCISTO DE LA MORTO" ESTAS ESPERANTISTO



Viktor But, armil-komercisto

La arestita, mondkonata rusa armil-komercisto Viktor But estas esperantisto. Li kreskis en Taĝikio, kie li ankaŭ lernis Esperanton. Post lia aresto en Tajlando, la landa asocio de UEA en Taĝikio verkis leteron subtene al Viktor But, invitante lin viziti Taĝikion. En la letero reprezentantoj de Asocio de Esperantistoj de Taĝikio skribas interalie: "Ni tre volas, ke la vero rapide gajnu la superecon, Vi povu liberiĝi kaj reiri al via agado por la bono de la socio."

Viktor But naskiĝis en soveta Taĝikio en 1967, poste studis en prestiĝa militista lingva instituto en Moskvo kaj estis sendita al Afriko kiel milita interpretisto. Post sia reveno li uzis la kaosan situation lige kun la disfalo de Sovetio, malmultekoste luante kelkajn ekssovetajn aviadilojn kaj dungante senlaborajn ekssovetajn pilotojn.

La aviadiloj estis poste uzataj por liveri enormajn kvantojn da armiloj al diversaj internaj militoj en Afriko. Poste lia komerca agado rapide vastiĝis, kaj li iĝis unu el la plej konataj armil-komercistoj en la mondo.

Pri li Douglas Farah kaj Stephen Braun verkis la libron *Merchant of Death* ("Komercisto de la morto"), kaj parte pri li temis la mondfama filmo *Lord of War* ("Lordo de la milito"), en kiu ĉefrolis la kinaktoro Nicolas Cage.

Laŭ multaj fontoj Viktor But regule vendis armilojn al ambaŭ flankoj de militaj konfliktoj. Estas indikoj, laŭ kiuj li vendis armilojn kaj al la talibanoj kaj al iliaj kontraŭuloj en Afganio, sed liajn servojn uzis ankaŭ Usono kaj Unuiĝintaj Nacioj. Mem Viktor But ĉiam insistis, ke

li faris nenion kontraŭleĝan, kaj ke ne li kulpas, eĉ se aviadiloj de liaj kompanioj estis uzataj por kontrabandi armilojn.

Viktor But longe loĝis en Belgio, sed en 2002 Interpol dissendis ordonon pri lia aresto, kaj li fuĝis al Rusio. Li fine estis arestita en Tajlando en marto 2008, post longa operacio de la usona kontraŭdroga agentejo DEA.

La usonaj sekretaj agentoj sukcesis kapti lin, dum li mem evidente kredis, ke li estis vendonta armilojn al la Kolombia ribela grupo FARC. De pli ol unu jaro en Tajlando daŭras la proceso por ekstradicii lin al Usono.

Lige kun la lasta fazo de la proceso la konata franca periodaĵo *L' Express* publikigis grandan artikolon pri Viktor But la 24-an de aprilo. La artikolo enhavas informon ankaŭ pri tio, ke Viktor But jam en sia infanaĝo lernis Esperanton.



Prezidanto Firdaus Ŝukurov el Duŝanbe, Taĝikio, kun la redaktoro en Bangaluro, Hindio, dum Azia Kongreso 2008

Pliaj esploroj montras, ke Viktor But komence de la 1980-aj jaroj efektive estis membro de la Esperanto-klubo en la ĉefurbo de Taĝikio, Duŝanbe. En la diskutforumo de rusia retejo <enovosti.info> antaŭ kelkaj semajnoj aperis letero de la veterana taĝikia esperantisto **Firdaus Ŝukurov**, kiu rakontas, ke la landa asocio de UEA en Taĝikio eĉ skribis leteron al Viktor But, post kiam lia aresto iĝis konata.

En la sama forumo poste aperis ankaŭ la kompleta teksto de la letero. Krom la unua enkonduka salutfrazo, la tuta letero estas ruslingva. Jen kompleta traduko al Esperanto:

Asocio de Esperantistoj de Taĝikio
N-ro 12, de la 17.12.2008

Al s-ro Viktor But
Tajlando, Bankoko

Saluton, estimata kamarado!
Estimata amiko, Viktor But,
Ni, la esperantistoj de Taĝikio, eksciis el
gazetoj kaj televidaj novaĵoj pri Via nuna
situacio. Ni estas profunde indignitaj, ke
Vin superfortis mensogoj, kaj ni
kunsentas al Vi.

Ni memoras Vin kiel aktivan, honestan
kaj konsciencan esperantiston, kiam Vi
studis la internacian lingvon Esperanto
en Taĝikio. Vi estis malindiferenta kaj
ĉiam pretis helpi al tiuj, kiuj tion bezonis.
Vi estis membro de nia Esperanto-klubo.
Surbaze de nia Klubo poste estis fondita
Societo de Esperantistoj de Taĝikio. En
la jaro 2005 ni fondis Asocion de
Esperantistoj de Taĝikio.

Ni tre volas, ke la vero rapide gajnu la
superecon, Vi povu liberiĝi kaj reiri al
via agado por la bono de la socio.

Ni estus tre ĝojaj, se Vi povus viziti nian
sunan respublikon, kie Vi frekventis
lernejon kaj faris la unuajn paŝojn en
sendependa vivo.

**Firdaŭs A. Sukurov, Prezidanto de AET
M.R. Rahmatov, Estrarano
Duŝanbe, Taĝikio**

La letero neniam estis sendita al Viktor
But. Ne pro tio, ke la gvidantoj de AET
ekdubus pri la "bono de la socio", kiun
alportis la komerca agado de Viktor But.
Laŭ klarigo de la prezidanto, oni timis, ke
la letero povus iel malutili al Viktor But
dum la jura proceso. Libera Folio

Raporto de la Internacia Pac-Instituto de
Stokholmo (SIPRI) malkaŝas ke 90% de
la transportistoj identigitaj en aferoj de
armil-kontrabando en Nigra Kontinento
estas uzataj ankaŭ de UN-Unuiĝintaj
Nacioj, **Eŭropa Unio**, NATO-landoj kaj
la ĉefaj **NeRegistaraj Organizoj**. "*Ci-
momente, la plej malbona loko de la tuta
mondo estas Darfur, Sudano, kie ĉiuj
transport-firmaoj listigitaj de UNO pro
kontraŭleĝa armil-trafikado transportas
ankaŭ karitatan helpon*", rimarkas Hugh
Griffiths, kunaŭtoro de la raporto.
Notindas tamen, ke iuj el la citataj
homamaj organizoj, kiel la **Ruĝa Kruco**
aŭ **Kuracistoj sen Limoj**, klarigas ke
estas malfacile al ili scii kiaj varoj estis
antaŭe transportitaj per la aviadiloj, kiujn
ili luas. Metro ĵurnalo, traduko de Angelos Tsirimokos



Redaktoro en milito de Darfur, Sudano, Afriko, dum Marto 2006



Aeraj veturistoj kiuj liveris armilojn en
konfliktaj terzonoj en Afriko, ankaŭ
konvojis humanitaran helpon en tiuj
regionoj... .."Tiel, ekzemple, la misioj
por la konservado de la paco de UN-o en
Sudano daŭrigis utiligi aparatojn
eksploatitajn de la **Sudana** kompanio
Badr Airlines, eĉ post la instigado de la
konsilio de sekureco de la UN-o
malpermesi tiun kompanion konsekvence
de ĝia leĝrompo pri la armembargo", laŭ
la raporto. SIPRI citas aliajn afrikajn
kompaniojn miksitajn kun arma
finegocado: Astral Aviation, African
International Airlines kaj Trans Attico, iu
kompanio registrita en **Sudano**. Pluraj
usonaj privataj societoj de sekureco
utiligis aviadajn veturistojn kaj
ĉartoprenis aparatojn "implikitajn en
armtrafiko por la profito de milicoj
kvalifikitaj de la usona registaro kiel
teroristoj". Tiel, la societo Dyncorp, kiu
provizas ĉe la usona registaro, helpon pri
temo de sekureco, estas signalita en tiu
raporto kiel utilinta la kompanion
Aerolift, akuzita en 2006 de la konsilio
de sekureco, esti implikita en la arma
komerco favore de islamista milico en
sudo de **Sudano**, la grupo Al-Shahab. La
raporto de SIPRI aldonas ke aeraj
veturistoj implikitaj en iuj operacioj pri
la konservado de la paco kaj pri
humanitara helpo ankaŭ kontribuis
transporti "sensivajn materiojn en
konfliktaj terzonoj" kiel kokaino,
diamantoj kaj multvaloraj metaloj.

Traduko de Lucien Michaux

MEDITOJ PRI LA TEMPO

Milfoje aĉa tempo malamiko,
ke kvieton al la homo fortrenas;
de l'universo, subtenon deprenas
kiel kosma eliksiro-mistiko.

De la vivo centro; kaj, umbiliko
de la mondo; vi, ĉiam dispromenas
per mezuro, ke neniam revenas
al nia viva agonitragiko.

Eterna principo; senspaco-fino,
ĉiam fuĝante kiel kosmtorento.
Aj!, vi estas de "Krono" la doktrino;

de la viv-mezuro, la elekvento;
kaj, de la historio, la destino,
flugante senĉese kiel la vento.

Alberto Garcia Orive, Bilbao, Hispanujo

LA MONSTRAÇO DE KABO BONESPERA

La monstraĉo kiu 'stas en marfino,
en nokto peĉnigra levis sin fluge,
trifoje li flugis ĉirkaŭ la navo,
trifoje li flugis kaj knaris,
kaj diris: "Kiu aŭdacis enveni
en miajn kavernojn, kiujn mi kaŝas
sub nigraj plafonoj de mondfino?"
Kaj jen la rudristo diris trem-treme:
"La reĝo Johan' La Dua!"

" 'Stas kies la veloj, kien mi tuŝas?
'Stas kies la kiloj, kiujn mi vidas?"
La monstro diris, kaj giris trifoje,
trifoje sordida giris kaj plumpa.
"Kiu venas por povi mian povon,
mi kiu loĝas kaŝita de ĉiuj
kaj eĉ la profundan maron timigas?"
Kaj jen la rudristo trem-treme diris:
"La Reĝo Johan' La Dua!"

Trifoje de rudro manojn li levis,
trifoje al rudro manojn li fiksas,
kaj diris postkiam tremis trifoje:
"Ĉi tie ĉe rudro mi 'stas pli ol mi:
mi 'stas Popol' volanta vian maron;
kaj pli ol la monstro min timigante,
kiu en la nigra mondfino giris,
vol' regas, gluante min al ĉi kudro,
de Reĝo Johan' La Dua!"

Fernando Pessoa, el la portugala tradukis João José Santos
Literatura reta revuo "La Karavelo", Estremoz, Portugalujo

AL VERDOKULA HELENJO

Ŝercversaĵo

Ŝiaj belaj okuloj mian koron efikis
Per la sago de l' amo, per la sag' de l' pasi'
Mi tuj perdis trankvilon,
efervesk' min ekpikis
Kaj sen kaŭz' plialtiĝis mia sanga tensi'.

Kio min afekciis? Kio min ade puŝas
Al senlima feliĉo, al ĝojo, al ard'?"
Sed la solvo facilas, kaj ĝislarne kortuŝas
- Ili ja samkoloras kun la verda standard'.

Paŭlo Paŝa Mevo Pavel Mojaev, Simferopolo, Krimeo

EN LABOREJO

En laborejo socialisma
Jam forpasinta, la altruisma,
La faciligoj estis diversaj.
Kompare nunajn tute inversaj.
En laborejo la Sindikatoj
Biletoj ankaŭ kun la rabatoj
Aŭ tute simple - ankaŭ senpage
Donantaj estis eĉ ĉiutage.

El laborejo multo devenis,
Ĝuste vi tio eĉ ne divenis.
De Sindikatoj laŭ ĉies revo
Zorgo pri homoj estis la devo.
El laborejo la trajnbiletoj,
Kristnaskaj karpoj kaj abietoj.
El laborejo ankaŭ leporoj,
Terpomoj, fruktoj, ovoj kaj floroj.

Bilet' senpage por la: koncerto,
Kino teatro, ali-oferto;
Kiel flosado per la kajako
Sur "Czarna Hancza" - rivera trako.
Vi unufoje dum ĉiu jaro
Povis ricevi por infanaro,
Tiel nomitan la kolonion,
Kiu ja kostis preskaŭ nenion.

Okan de marto, dum virinfesto
Laboristinojn kun ĝentilgesto
Ĉefoj regalas per diversajoj:
Per bombonujojn kaj eĉ vestaĵoj.
Per fuŝkvalitaj ŝtrumpantaloj,
Aŭ per nomataj la vartalonoj,
Sed ankaŭ ĉio per printempfloroj
Laŭ la regantaj tiamaj moroj.

Włodzimierz Scisłowski
El la pola tradukis Edward Jaskiewicz

AGAPO

Jam de jaroj okazas Sankta Meso esperante en Bruselo. Ne regule sed kelkfoje jare en eŭropa katolika centro. Dank'al pastro Peter Knauer s.j., jama studento de la nuna papo Benedikto XVI, kiu kreis vere kristanan, amikan etoson. Katolikoj kaj ne katolikoj, venas por iom preĝi, kanti, kaj poste okazas agapo kun simbola vino, dolĉaĵoj ..., kiu kuraĝigas babiladon. Tio allogas multajn esperantistojn kiuj ne venas al la kutimaj merkredaj renkontiĝoj de EBG. Ni jam havis gastojn el malproksimaj landoj, diplomatojn kaj aliajn interesajn esperantistojn diversnaciajn, ne nur el Bruselo. La lasta renkontiĝo antaŭ la somera libertempo okazis la 1an de Majo, kaj estis vere belega spirita regalo. Flory Witdoeck, el Ostendo, kantis

15
irlandan kanton esperantigitan de Seán Oriain, kaj poste li, kun siaj infanoj, kantis irlande. Belege!



Post reveno de vojaĝoj, libertempoj, k.t.p., ni jam havas daton por renkontiĝi en nova sezono. Do, rezervu la 20an de septembro (dimanĉo), je la 18a horo. Strato Cornet / Hoorn, nro 51. Facile atingebla per metroo (stacio Schuman) aŭ buso 27 (haltejo Parko Leopolda aŭ Nerviens). Bonan, sanan kaj agrablan someron al vi.

Barbara Poterucha, Guido Ricci kaj Angelos Tsirimokos



SANDRA SCHWEDER



Unu el la plej novaj membroj de EBG - Esperantista Brusela Grupo, ek de ŝia translokiĝo al Belgio kaj enloĝiĝo en Bruselo antaŭ kelkaj monatoj, tuj aliĝis al la grupo kaj daŭre ĉeestas ofte en la merkredaj kunvenoj.